VIDU ŜTON-URBON”



ĴENJA AMIS

ĴENJA AMIS

Ĵenja Amis, Ukrainio/Usono

Tiuj tri simplaj vortoj fariĝis vizit-karto de unu el la plej interesaj lokoj en la mondo. Tio tute ne estus stranga afero, se tiuj vortoj ne starus... sur ordinaraj bestejoj! Dum jardekoj oni povis vidi tiujn vortojn sur centoj da bestejoj tra multegaj ŝtatoj en Usono, ekde Miĉigano ĝis Teksaso. Kial oni faris tiujn skribaĵojn sur bestejoj? Kio estas la Ŝton-**Urbo? Kion oni povas vidi tie? Mi tuj rakontos!**

La Ŝton-Urbo troviĝas sur la supro de la Monto *Lookout*. Tiu monto estas sam-tempe en tri ŝtatoj: Georgio, Tenesio kaj Alabamo, sed de sur ĝia supro oni povas vidi sep ŝtatojn, se estas klara tago. Ĝuste pro tio oni donis al tiu monto la nomon *Lookout* – la Elrigarda Monto. Antaŭ longa tempo tie loĝis indianoj, kaj la unuaj ne-lokanoj, kiuj ek-sciis pri la Ŝton-Urbo, estis du **misiistoj** – tio okazis la 28-an de aŭgusto 1823. La beleco de tiu loko vere mir-igis ilin, same kiel ĝi mir-igas ĝis nun ĉiujn, kiuj vidas ĝin. Kredu aŭ ne – sed ĉiu ŝtono en la Ŝton-Urbo havas sian “personecon”. Ili estas kvazaŭ **fabelaj gigantoj** el la popol-rakontoj, kiuj vivis sur nia Tero en la prahistoria tempo, kaj pro iu **magio** ial ŝton-iĝ-is.

La 1930-aj jaroj estis tre malfacila tempo por Usono, sed ĝuste en tiu tempo la tuta lando eksciis pri la Ŝton-Urbo. Pro tio oni devas danki la geedzojn Garnet kaj Frieda [frida] Carter [karter]. La edzo – Garnet – ankoraŭ en la 1920-aj jaroj konstruigis sur la Elrigarda Monto domojn por la komun-umo kun interesa nomo: **Fein**-lando. Tiun nomon li donis al ĝi ĉar lia edzino Frieda tre interesiĝis pri eŭropaj popol-rakontoj. (Estas interese, ke ankaŭ nun sur la Elrigarda Monto estas “strato Cindrulino”, “strato Peter Pan”, “strato Aladeno” kaj tiel plu...) Kaj estis ĝuste Frieda, kiu “kulturis” la Ŝton-Urbo kaj faris el ĝi belegan ĝardenon: ŝi kolektis por la Ŝton-Urbo florojn kaj arbojn el diversaj lokoj. Ankaŭ la “fabela **kaverno**”, kun **gnomoj** kaj aliaj fabelaj estaĵoj, estis ŝia ideo.

Kaj jen, kiam la ĝardeno estis preta kaj atendis vizitantojn, restis nur unu “problemeto”: la Ŝton-Urbo troviĝas malproksime de grandaj urboj kaj grandaj vojoj. Kion fari? Kiel sci-igi al la homoj pri tiu belega loko sen uzi tro da mono? La respondon el-pensis Garnet Carter: li proponis al kamparanoj, kiuj loĝas proksime al la vojoj, senpage **farbi** iliajn bestejojn. La sola afero – oni devas skribi sur ili kelkajn **reklamajn** vortojn. La kamparanoj, kompreneble, konsentis – kaj ĝuste tiel naskiĝis tiu ĉi fama vizit-karto de la Ŝton-Urbo.

Nun, pro la malapero de tiaj bestejoj, pro malkresko de kamparaj vojetoj kaj simple pro la nun-temp-iĝo, la reklamoj de la Ŝton-Urbo aperas pli ofte sur la vojaĝaj paĝoj de gazetoj, kaj la famaj vortoj “Vidu Ŝton-Urbon” staras sur la grandaj voj-reklamoj, apud la kutimaj reklamoj de rapid-manĝejoj. Sed eĉ nun, tie kaj jene laŭ la vojo al la Ŝton-Urbo, foje aperas tiuj malnovaj bestejoj, kun kelkaj simplaj vortoj, kiel **nostalgia** rigardo al la tempo de niaj gepatroj, geavoj kaj pra-geavoj.

fabelo – literatura verko, plej ŝatata de infanoj
farbi – kolorigi
feino – bela kaj bona fabela estaĵo
giganto – grandegulo
gnomo – fabela estaĵo (vd. suban maldekstran foton)
kaverno – sub-ter-ejo
magio – super-naturaj agadoj por ŝanĝi aŭ regi homojn/bestojn/aĵojn
misiisto – homo sendita en alian lokon por dis-vast-igi sian kredon kaj/aŭ helpi al lokanoj
nostalgio – malgajeco pri io (ĉi tie: pri pasinta tempo)
reklami – dis-kon-igi
ŝtono – vd. supran maldekstran foton

ĴENJA AMIS



VIKIPEDIO